esperanto.es

# La Bitbulteno

NUMERO: 35
2017-03-12

**Saluton !**

**He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la Federación Española de Esperanto.**

**Jen nova numero de la Bitbulteno de Hispana Esperanto-Federacio.**

## INAUGURACIÓN DEL AÑO ZAMENHOF

Como anunciamos en el anterior Bitbulteno, el pasado 9 de febrero tuvo lugar la presentación del Año Zamenhof en España. El acto se desarrolló aprovechando la exposición sobre el esperanto que, en colaboración con el Instituto Polaco de Cultura, se ha mostrado en la Biblioteca Pública de Vallecas (Madrid), donde se encuentra ubicado el llamado Centro de Interés Cultural Polaco de Madrid.

El **Año Zamenhof** conmemora durante 2017 el centenario del fallecimiento del Dr. Lázaro Zamenhof, el iniciador del idioma internacional esperanto. La conmemoración cuenta con el respaldo de la UNESCO, el organismo de las Naciones Unidas por la educación, la cultura y la ciencia, a propuesta del gobierno de Polonia con el apoyo de Alemania y Eslovaquia.

El evento fue presentado por la directora de la citada Biblioteca Pública de Vallecas, y en él participaron la directora del Instituto Polaco de Cultura en Madrid, el director de la Fundación Esperanto y el presidente de la Federación Española de Esperanto, y se complementó con una visita guiada a la exposición.

Durante la presentación se comunicó una importante primicia: la Organización Nacional de Ciegos Españoles (ONCE) nos ha confirmado que uno de sus cupones de este año, concretamente el del 12 de agosto, homenajeará la figura del Dr. Zamenhof. Durante los próximos meses informaremos con más detalle.

La Federación Española de Esperanto ha planteado un conjunto de celebraciones, que iremos detallando durante los próximos meses. Si estás interesado, conéctate a nuestras sedes sociales o escríbenos para colaborar.

## INAŬGURO DE LA JARO ZAMENHOF

Kiel ni anoncis en la pasinta Bitbulteno, Hispana Esperanto-Federacio komencis en februaro la celebradon de la **Jaro Zamenhof**, la kunmemoron de la datreveno de la morto de D-ro Lazaro Zamenhof, la iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto, agnoskitan de UNESKO, la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por edukado, kulturo kaj scienco.

La formala inaŭguro okazis la 9-an de februaro, en la Publika Biblioteko de la kvartalo Vallecas, kie situas la t.n. Centro de Pola Kulturintereso de Madrido (loko por elmontrado de la kulturo de la komunumoj de enmigrintoj en la regiono). En la prezentado partoprenis la direktorino de la Biblioteko, la nova direktorino de la Pola Instituto pri Kulturo en Madrido, kiu montris la apogon de la institucio al la agado de la esperantistoj, kun la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio kaj la direktoro de Fondumo Esperanto. Oni kompletigis la prezenton per gvidata vizito al la ekspozicio pri Esperanto montrata en la halo de la Biblioteko.

Dum la prezentado oni informis pri ĵusa anonco: ni ricevis la konfirmon ke la hispana organizaĵo de blinduloj, la ONCE, dediĉos unu el la biletoj de la tre fama loterio ("cupón"), tiun de la 12a de aŭgusto ĉijara, al la figuro de Dro. Zamenhof.

Dum la venontaj semajnoj ni plu informos pri aliaj detaloj de la agadoj antaŭvidataj. Sekvu niajn informojn en la sociaj retejoj aŭ abonu niajn bultenojn por resti informita. Kontaktu kun HEF por koni la detalojn, kaj ankaŭ por kunlabori en la organizado de aliaj iniciatoj.




**ZAMENHOF EN LA CASA SEFARAD**

El 2 de febrero, el presidente de la Federación Española de Esperanto, José Antonio del Barrio, impartió una [charla sobre la figura del Dr. Zamenhof](), su obra y sus ideas, en el Centro Sefarad-Israel de Madrid, organismo del Ministerio de Asuntos Exteriores de España para promover las relaciones con la cultura y comunidad judía, en su sede del Palacio Cañete, una construcción histórica situada en plena Calle Mayor de Madrid.

La conferencia tuvo lugar con ocasión del inicio del Año Zamenhof, y durante la misma se repasó también la conexión del Dr. Zamenhof con la cultura judía y el contexto histórico del desarrollo de su obra.

La conferencia puede verse completa en la dirección: https://www.youtube.com/watch?v=5aFoyYYhZ3o.

Como consecuencia, unos días después, el 6 de febrero, fue entrevistado por Radio Sefarad, una emisora especializada en la cultura judía.

**ZAMENHOF EN CASA SEFARAD**

La 2an de februaro, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prelegis pri Dro. Zamenhof, lia verko kaj ideoj en la Centro Sefarad-Israel, institucio kreita de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj por flegi la rilatojn kun la juda kulturo, kies sidejo troviĝas en historia palaco en la strato Mayor de Madrido.

La evento estis organizita por kunmemori la Jaron Zamenhof, okaze de la 100a datreveno de la forpaso de la iniciatinto de la lingvo Esperanto, kaj dum ĝi estis pritraktita ankaŭ la konekto de Dro. Zamenhof kun la juda kulturo de lia tempo kaj la historia kunteksto de lia verkaro kaj idearo.

La tuta prelego estas spektebla rete (hispanlingve) ĉe https://www.youtube.com/watch?v=5aFoyYYhZ3o.

Kiel sekvo, la 6an de februaro, li estis intervjuita en radio rilata al la juda kulturo por hispanlingvanoj, Radio Sefarad.

UNESCO
Organización de las Naciones Unidas para la Educación, la Ciencia y la Cultura

100º aniversario de la muerte de Ludwik Zamenhof
Celebrado en asociación con la UNESCO

**INAUGURACIÓN DE EXPOSICIÓN EN CHESTE**

En estos días la exposición sobre el esperanto y el Dr. Zamenhof se encuentra en Cheste, ciudad de la provincia de Valencia, que goza de una larga tradición en relación con esta lengua internacional, y cuenta con un importante club local, de nombre "Lumradio".

La exposición fue inaugurada el 3 de marzo en el Teatro Liceo de la ciudad, con discursos del alcalde, José Morell, la concejal de cultura, María Angeles Llorente, y el presidente de la Federación Española de Esperanto, José Antonio del Barrio, tras la presentación del presidente

**INAŬGURO DE EKSPOZICIO EN CHESTE**

Dum tiuj ĉi tagoj, la ekspozicio pri Esperanto kaj Dro. Zamenhof troviĝas en Cheste, urbo en la provinco Valencio, kun tre granda tradicio pri Esperanto, sidejo de la historia klubo "Lumradio".

La ekspozicio estis inaŭgurita la 3-an de marto en la Teatro Liceo de la urbo, per paroladoj de la urbestro, José Morell, la urbkonsilisto pri kulturo, María Angeles Llorente, kaj la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio. Ili estis prezentitaj de José Manzanera, la prezidanto de la loka grupo.

del grupo, José Manzanera.

Ambos representantes, el alcalde y la concejala, subrayaron la rica historia del esperanto en Cheste, ciudad en la que hasta tres calles llevan el nombre de esperantistas, y mostraron su apoyo para que la tradición continúe en el pueblo.

Ambaŭ reprezentantoj, la urbestro kaj la urbkonsilistino, substrekis la riĉan historion de Esperanto en Cheste, en kiu eĉ tri stratoj portas la nomon de esperantistoj, kaj montris sian apogon por ke tiu tradicio plu daŭru en la vilaĝo.



**MÁS SOBRE EL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO**

A finales del primer periodo de adhesión, unas 75 personas se han apuntado ya al 76 Congreso Español de Esperanto, que tendrá lugar entre el 23 y el 25 de junio en Teruel.

El día 3 de marzo el presidente del Comité Organizador, Alberto Granados, y el presidente de la Federación Española, José Antonio del Barrio, presentaron a los medios de comunicación locales las líneas básicas del Congreso. La noticia fue recogida por el Diario de Teruel, el Heraldo de Aragón y El Periódico de Aragón, y ambos fueron entrevistados por la Cadena Ser y Radio Nacional de España en Teruel.

La presidencia de honor del congreso será ostentada por la alcaldesa de la ciudad, que inaugurará el evento el viernes por la tarde. El sábado se dará nombre a la Glorieta del Esperanto en la ciudad. El programa aparece ya en la página web del congreso, e incluirá exposiciones, actuaciones musicales, conferencias, observaciones astronómicas, reuniones, visitas turísticas y muchas otras actividades.

Está previsto además un encuentro previo para estudiantes y una visita turística el día previo, 22 de junio. Un seminario formativo en esperanto los días 26 y 27 completarán las actividades para quien pueda quedarse a disfrutar de la ciudad.

El día 21 de junio será organizado un acto público de presentación en Madrid. Aquellas personas que vengan, especialmente desde otros países, vía Valencia o Barcelona, pueden contactar con la Federación para que les pongamos en contacto para organizar alguna actividad o visita a la respectiva ciudad, y también para facilitar el viaje a Teruel, en la medida de lo posible.

Recordamos que durante este año, además del Año Zamenhof, celebramos el 800 aniversario de la leyenda de los Amantes de Teruel. Será un congreso de amantes… amantes de esperanto.

**PLIE PRI LA HISPANA KONGRESO EN TERUEL**

Fine de la unua aliĝperiodo jam 75 homoj konfirmis sian ĉeeston en la 76a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝos de la 23a ĝis al 25a de junio en la aragona urbo Teruelo.

La 3an de marto, la prezidanto de la LKK, Alberto Granados, kaj la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, prezentis al la lokaj amaskomunikiloj la bazajn liniojn de la Kongreso. La novaĵo estis publikigita en la tri ĉefaj lokaj kaj regionaj ĵurnaloj, Diario de Teruel, Heraldo de Aragón kaj El Periódico de Aragón, kaj ambaŭ estis intervjuitaj en la radiostacioj Cadena Ser kaj Radio Nacional de España en Teruelo.

Oni anoncis tie ke la urbestrino de Teruelo inaŭguros la kongreson vendrede vespere, kaj ke sabate matene oni atribuos la nomon “placo de Esperanto” al spaco en la urbo. La detala provizora programo aperas jam en la retejo de la kongreso, kaj ĝi entenas ekspoziciojn, muzikajn koncertojn, prelegojn, astronomian observadon, kunvenojn, turismajn vizitojn kaj multajn aliajn aktivadojn.

Oni krome antaŭvidas renkonton por komencantoj kaj turisman viziton la antaŭan tagon, 22an de junio. Seminario por aktivuloj la 26an kaj 27an kompletigos la aktivadojn por tiuj kiuj povos resti por ĝui la urbon.

La 21an de junio oni organizos publikan prezentadon en Madrido. Tiuj personoj alvenantaj el aliaj landoj, tra Valencio aŭ Barcelono, povas skribi al la Federacio por ke ni metu ilin en kontakto kun lokaj esperantistoj, por organizi aktivadon aŭ viziton al la koncerna urbo, kaj por faciligi komunan vojaĝon al Teruelo, se eble.

Ni rememorigas ke, krom la Jaron Zamenhof, ni kunmemoras en tiu ĉi jaro la 800-jaran datrevenon de la legendo de la Geamantoj de Teruelo. Tiu ĉi estos kongreso de amantoj… amantoj de Esperanto.

Pliaj informoj http://www.esperanto.es/kongreso.

Más información http://www.esperanto.es/congreso. Y para apuntarse: http://www.esperanto.es/kongresaligo

Kaj por aliĝi: http://www.esperanto.es/kongresaligo.




**EXÁMENES OFICIALES DE ESPERANTO EN JUNIO**

El portal edukado.net, con el apoyo de la Asociación Universal de Esperanto, ha convocado para el mes de junio una sesión mundial de exámenes de esperanto según el MCER (Marco Común Europeo de Referencia).

En esta modalidad, las partes escrita y oral se organizan de forma separada. El día 10 de junio se realizará el examen escrito de forma simultánea en diversas partes del mundo. Una de las sedes será Zaragoza, a donde podrán desplazarse las personas interesadas, aunque es aún posible convocar otras pruebas en otras ciudades si hay un número mínimo de interesados. Para nuestros lectores latinoamericanos, podemos confirmar que también habrá examen en Managua.

La prueba oral tendrá lugar durante el Congreso Español de Esperanto que se celebra dos semanas después, el 24 de junio.

Para más información: http://edukado.net/ekzamenoj/ker  Los interesados, pueden escribir a kurso@esperanto.es.

**KER-EKZAMENOJ EN JUNIO**

La organizaĵo edukado.net, kun apogo de Universala Esperanto-Asocio, kunvokis por la monato junio mondan sesión de ekzamenoj de Esperanto laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

Laŭ tiu ĉi modelo, la skriba kaj parola partoj estas aparte organizataj. Por la 10a de junio oni programis la skriban ekzamenon samtempe en diversaj urboj de la mondo. Unu el la sidejoj estos Zaragozo, kien povos vojaĝi ĉiuj interesitoj. Ankoraŭ eblos organizi ĝin ankaŭ en aliaj urboj, se ariĝas sufiĉa nombro da interesatoj. Por niaj latinamerikaj legantoj, ni povas konfirmi ke okazos ekzameno en Managvo.

La parola ekzameno estos celebrata dum la Hispana Esperanto-Kongreso kiu disvolviĝos du semajnojn poste, la 24an de junio, en proksima urbo Teruelo.

Por pliaj informoj: http://edukado.net/ekzamenoj/ker. Interesatoj kaj kandidatoj, bv. skribi al la adreso kurso@esperanto.es.

**ENCUENTROS JUVENILES**

Nuestra sección juvenil, HEJS, participa en un proyecto de la Unión Europea, organizado por la asociación mundial de jóvenes esperantistas, TEJO, sobre comunicación eficaz para la juventud. Dos jóvenes españoles participarán en el evento PEKO, este mes de marzo. Están previstas más actividades posteriores, así que, si eres joven, menor de 31 años, contacta con HEJS

**JUNULAJ RENKONTOJ**

Nia junulara sekcio, HEJS, partoprenas en projekto de la Eŭropa Unio, organizita de la tutmonda asocio TEJO, pri efika komunikado por junularo. Du junuloj el Hispanio partoprenos en la evento PEKO, organizita de skolta asocio, kaj trejniĝos pri tiuj ĉi du temoj: kiel paroli kun diversaj aŭdiencoj (aĝgrupoj, personecoj, ktp) kaj kiel varbi/vendi ideojn. Venos pli postaj

para participar de forma gratuita. El evento siguiente tendrá lugar en España, concretamente en Teruel, los días 26 y 27 de junio, justamente tras el Congreso Español de Esperanto.

Además, HEJS, junto con la asociación de jóvenes esperantistas catalanes, KEJ, ha decidido presentar su candidatura para organizar el Congreso Internacional de Jóvenes Esperantistas del año 2018 en la ciudad de Badajoz, aprovechando que el Congreso Universal de Esperanto de ese año tendrá lugar en Lisboa. Si eres joven (o si no lo eres, pero deseas ayudar, sobre todo si vives cerca) contacta con HEJS, hejs@esperanto.es, para colaborar con el equipo organizador.

eventoj, kaj se vi estas juna, malpli ol 31 jaraĝa, kontaktu kun HEJS por senpage ilin partopreni. La posta evento okazos en Hispanio, en Teruelo, la 26an kaj 27an de junio, tuj post la Hispana Kongreso.

Krome, HEJS, kune kun la Kataluna Esperantista Junularo, decidis kandidati por organizado de la Internacia Junulara Kongreso de 2018, en la urbo Badaĥozo (Badajoz), profitante ke la tiujara Universala Kongreso okazos en Lisbono (Portugalio). Se vi estas juna (aŭ se vi ne estas tiom juna kaj pretas helpi, speciale se vi loĝas proksime), bv kontakti kun HEJS, hejs@esperanto.es, por kunlabori kun la organiza skipo.

## SEMANA INTERNACIONAL DE LA CULTURA Y EL TURISMO

Uno de los encuentros más tradicionales y exitosos organizados en la Península Ibérica, la Semana Internacional Esperantista de la Cultura y el Turismo, alcanza en 2017 su 25 edición con un nuevo equipo organizador.

Esta año tendrá lugar entre el 30 de septiembre y el 7 de octubre en Tossa de Mar, en la 'Costa Brava' (provincia de Gerona). Se trata de una encantadora ciudad, tradicionalmente dedicada a la pesca, y actualmente al turismo.

Más detalles sobre el encuentro y la forma de apuntarse aparecen ya en la web: https://kulturacentro.blogspot.com.es/

## INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO

Unu el la plej tradiciaj kaj sukcesaj renkontiĝoj organizataj en la Iberia Duoninsulo, la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, atingas en 2017 sian 25an eldonon, kun nova organiza skipo.

En tiu ĉi jaro ĝi okazos de la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro en la urbo Tossa de Mar, en la t.n. 'Costa Brava' (laŭlitere: Sovaĝa Marbordo, duonvoje inter Barcelono kaj la franca landlimo). Ĉi tiu bela urbeto, antaŭe fiŝkaptista vilaĝo, nuntempe estas plejparte turisma loko, tre vizitata.

Pliajn detalojn kaj aliĝilon oni povas trovi ĉe: https://kulturacentro.blogspot.com.es/




## LIBRO BILINGÜE DE CONOCIDA POETA

La editorial LASTURA publica una nueva edición del poemario de María Ángeles Maeso "Vamos, vemos", ganador del Premio Internacional de Poesía León Felipe en 2003, esta vez en una versión bilingüe, español-esperanto, con el título "Vamos, vemos - Ni iras, vidas".

## DULINGVA POEMARO DE FAMA VERKISTINO

La eldonejo Lastura ĵus publikigis poemaron de la konata hispana poetino María Ángeles Maeso en dulingva (hispana-esperanta) versio. Temas pri la tria eldono de la sukcesa poemaro 'Vamos, vemos', kiu en 2003 ricevis la Internacian Poezi-

De la versión de los poemas al esperanto se ha ocupado el conocido poeta esperantista Miguel Fernández, que también ha escrito el prólogo a esta tercera edición.

El libro puede adquirirse en la web de la editorial, al precio de 10 euros en http://lastura.es/.

Premion León Felipe. La E-poeto Miguel Fernández okupiĝis ne nur pri la traduko, sed ankaŭ pri la prologo al tiu ĉi tria eldono, titolita "Vamos, vemos - Ni iras, vidas".

Eldonejo Lastura meritas esti reciprokata de la esperantistaro per aĉeto de la libro –cetere, poezie, lingve kaj eldone plej altkvalita–, akirebla en ordinaraj librovendejoj kaj ĉe http://lastura.es/ kontraŭ po 10€. La afero vere gravas, ĉar se nia reago pozitivos, Lastura certe entreprenos pliajn tiuspecajn eldonojn, kiuj donas prestiĝon al nia lingvo, al nia literaturo kaj, ĝenerale, al la E-kulturo.




**VENTA DE LIBROS**

La Federación Española de Esperanto ha renovado su servicio de venta de libros, con ocasión del Año Zamenhof 2017. Empezando por un precio especial del libro "El hombre que desafió a Babel".

Ver lista de precios (incluyendo rebajas para miembros de la Federación), y formas de conseguirlos en: http://www.esperanto.es/hef/index.php/aprender-esperanto/venta-de-libros

**LIBROSERVO DE HEF**

Hispana Esperanto-Federacio profitis la komencon de la Jaro Zamenhof por renovigi sian Libroservon. Okaze de tiu ĉi jaro, ni proponas rabaton de la biografio de Dro. Zamenhof, “El hombre que desafió a Babel”.

Vidu liston de prezoj (inklude de rabatoj por membroj de HEF) kaj manierojn ilin akiri, ĉe: http://www.esperanto.es/hef/index.php/aprender-esperanto/venta-de-libros

